Albrecht Kronenberger,

# Spirito de Di'

1. Spirito de Di',
Spirito de l' Patro,
Spirito de l' Filo
ho Sankta Spirit'!
Venu kaj loĝu en mi.

2. Spirito de Di',
ho forno de l' amo,
Vi fajro kaj flamo,
ho sankta Spirit'!
Ardu kaj brulu en mi.

3. Spirito de Di',
ho lango kaj vorto,
ventego kaj forto
ho Sankta Spirit'!
Ŝtormu, parolu el mi.

4. Spririto de Di',
intimo de l' koro,
animo-mentoro,
ho Sankta Spirit'!
Spiru kaj preĝu en mi!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Albrecht Kronenberger *(∗1940-01-21).*

*Arg-831-1668 (2013-02-18 21:47:29)*

*Originale verkits da s-ro pastro Albrecht Kronenberger en 2012-10-01, kantebla laŭ la melodio de la germana kanto "Die Dämmerung fällt". La teksto aperis en la dumonata kristana revuo "Dia Regno", n-ro 1 (898) 2013. Pri la melodio vidu ankaŭ:*http://www.volksliederarchiv.de/text4679.html *kaj* http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/diedaemm.html *. La melodie aŭdeblas en* http://www.youtube.com/watch?v=5vDaCAzS_ds *.*